# Forpasis BoriÅ¡a MiliÄ‡eviÄ‡

Aldonita de Dimitrije JaniÄ•iÄ‡
04/02/2013

BoriÅ¡a MiliÄ‡eviÄ‡, konata serbia esperantisto, forpasis en Novi Sad la 2-an de februaro 2013.

BoriÅ¡a MiliÄ‡eviÄ‡ naskiÄ•is la 14-an de oktobro 1931 Ä‰e KurÅ¡umlija (Serbio). Li diplomitiÄ•is Ä‰e la Filologia fakultato en Beogrado. Li parolis kaj skribis en 8 (ok) fremdaj lingvoj kaj estas oficiala (Äµurinta) tradukanto de kvar fremdaj lingvoj (franca, germana, hispana kaj portugala).

Oficis en RaÄ•a, NiÅ¡, Novi Sad. La oficperiodon finis kiel konsilisto pri bankrilatoj kun eksterlando en Deviza Sektoro de Privredna banka, Novi Sad. Pensiulo ekde la 1-a de decembro 1997.

Li fariÄ•is esperantisto kiel studento en 1953 en Beograd. Kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo en Beograd. Plenumadis diversajn gravajn funkciojn en Esperanto-societoj, Vojvodina Esperanto-Ligo, Serbia Esperanto-Ligo kaj Jugoslavia Esperanto-Ligo.

Estis Ä•enerala sekretario de TEJO-Kunvenoj (1955-1956), kaj trifoje JEL-delegito (1977-1979, 1983-1986, 1992) en UEA-Komitato, Rotterdam. Laste li estis delegito de UEA por urbo Novi Sad.

Ekde 1984 li plenumas volontule la funkcion de direktoro de Esperanto-Instituto de SEL. Li posedis C-diplomon (profesoro de Esperanto). Dum jaroj gvidis diversgradajn Esperanto-kursojn, estis Äµuriano de la revuo "VoÄ‰o", Borovo en l976, kaj de Esperanto-societodeÂ  Malto por aprezo de E-tradukoj de la poemoj de Maltaj poetoj en 1989.

Kunlaboris en diversaj gazetoj ekde 1954 Ä•is nun. Dum jaroj li okupiÄ•is pri tradukado al Esperanto kaj el Esperanto. Redaktis 4 Esperanto-kolektojn/antologiojn de Serbio, Makedonio, Kroatio, kaj Bosnio kaj Hercegovino.

Menciita laÅ la tradukaÄµoj en la monda (enciklopedia) publikaÄµo â€œEsperanto en Perspektivoâ€• (UEA/Centro de Esploro k Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo, Londono-Rotterdam, 1974).

Dum jaroj li okupiÄ•is pri bibliografio de Esperanto-eldonaÄµoj en Jugoslavio, Serbio, Kroatio, Respubliko Serba (BkH) kaj Makedonio. Lia Propra bi(bli)ografio estas aperigita libroforme en Banja Luka en 2008.

Distingita per Medalo de Laboro fare de Prezidento de Respubliko, Ordeno por meritoj en Esperanto-movado fare de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Gajnis Oran Insignon de Serbia Kultur-kleriga Komunumo kaj Plakedon de Serbia UniuÄ•o de sciencaj kaj fakaj tradukistoj, kaj aliajn rekonojn. Oficiale, aÅ koncerne Esperanton, aÅ private, li vizitis 18 landojn de

EÅropo (14), Afriko (2), Ameriko (1) kaj Azio (1).

Fonto:Â  edukado.net